

1975 decembro

68-a jaro

n-ro 840 (12)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

NE ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — rotterdam-3002 — nederlando



Beletra
numero

Vi trovos

ke ĉi tiu literatura numero ne estas antologia, sed rentgena. Ne estis la celo kribri kaj selekti, oni volis enfokusigi kaj fotografi la aktualan staton de la Esperanta beletro. La numero do ne estas aparte frizita kaj tial vi en ĝi trovos eĉ kelkajn neatenditajn taŭzaĵojn. Vi certe rimarkos, ke, ĝuste kiel en la realo, la poezio pompas per pluraj perlaĵ pecoj, dum la prozo ankoraŭ lame lernas paŝi.

Ni konscias, ke ne la tuta legantaro de la revuo estas literaturema. Supozeble, tamen, la tuta legantaro profunde konscias kion ĉi tiu lingvo ŝuldas al sia beletro, precipe la poezia. Estas tial pardoninde, ke ni iom perforte regalias ĉiujn per versoj. Foje en la estonteco, ni probable preparos ankaŭ specialan komercan numeron de ĉi tiu revuo — kiam la komerco ludos tiun rolon en la vivo de la Internacia Lingvo, kiun en ĝia ĝisnuna historio ludis la poezio. Ĉiukaze, tio ne dependas de la poetoj nek de la redaktoroj, tio dependas de la komercistoj. Idealismo ne estas poeta monopollo, kiel klare diras unu el la kontribuintoj al ĉi tiu numero.

Enhavo

- 201 Pensoj pri la Esperanta literaturo (Vilmos Benczik)
- 202 Laŭdo al la paco (Aristofano, tr. D.B. Gregor)
- 204 Letero al William R. Harmon (William Auld)
- 205 Tri poemoj (Wouter Pilger)
- 206 Romeo kaj Frina (Karolo Piĉ)
- 208 Polucio (Edwin de Kock)
- 209 Parkmomentoj (Edwin de Kock)
- 210 La granda Meaulnes (Alain Fournier, tr. Roger Bernard)
- 210 La bufo (Tristan Corbière, tr. Roger Bernard)
- 211 Belartaj Konkursoj 1975: Tradukita poezio. Ĥoro de bakĥantinoj (Eŭripido, tr. Albert Goodheir). La blinda knabo (Colley Cibber, tr. William Auld)
- 212 Belartaj Konkursoj 1975: Originala poezio. Postsomeraj strofoj (Albert Goodheir). Uraganoj (Nicolino Rossi)
- 213 Belartaj Konkursoj 1975: Nova Talento. Tri poemoj (Miroslaw Wiechowski). La tago plej kurta (Jonas Negalha, tr. M. Wiechowski)
- 214 Troigo (Emilija Lapenna)
- 216 Akcidento (Vesna Skaljer-Race)
- 217 El la antaŭparolo al La trofeoj (Gaston Waringhien). La forgeso (J.M. Hérédia, tr. G. Waringhien)
- 218 Premio Luigi Minnaja. Premio Raymond Schwartz. Indekso 1975.

La kovrilo

La titolo — "Floroj" — de ĉi tiu fotografia verko de la hungaro Zoltán Fejér estas bela pruvo pri tio, ke la arto fajfas pri scienca precizeco. La botanikistoj bonvolu ne ĉikani pri tio, ke fakte temas pri semaroj — ĉar unu el la ĉefaj celoj de la arto estas ĝuste tio: elsorĉi florojn el velkaĵoj, belon el malbela, ordon el malordo aŭ, kiel Baudelaire, "oron el koto".

Zoltán Fejér gajnis per du aliaj verkoj la duan premion en la fotografia branĉo de la Belartaj Konkursoj 1975. Pri la fotokonkurso 1976 aperas detaloj sur la paĝo 189.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Telefono: (010) 36 15 39.

Telegramadreso:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Fondita en 1905 de Marcel Paul Berthelot (1881-1910).

Redaktoro: Simo Milojević.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Abonprezo por unu kalendara jaro: 37,50 gld. (kun membreco kaj Jarlibro 50,— gld.) Unuopa ekzemplero 3,— gld. Por jara aerpoŝto aldonu: Oceanio 16,50; Sudameriko 13,75; Suda Afriko, Azio 11,—; Meza kaj Norda Ameriko, Mezoriento, Meza kaj Norda Afriko 8,25 gld.

Anonctarifo: 1p. 375 gld.; 1/2p. 200 gld.; 1/4p. 110 gld.; 1/8p. 65 gld.; 1/16p. 40 gld. Ripetrabato 20%

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-singel 93, Rotterdam-3002 (konto n-ro 25.52.89.804).

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj kaj kulturo: D-ro Humphrey R. Tonkin, 286 Iffley Road, Oxford OX4 4AA, Britio; tel. (0865) 47408.

Vicprezidanto kaj estrarano pri landa kaj regiona agado: D-ro W. Bormann, Schärstr. 26, D-205 Hamburg 80, FRG; tel. (040) 7384508.

Vicprezidanto kaj estrarano pri faka agado: Prof. d-ro C. Støp-Bowitz, Camilla Colletts vei 3, Oslo 2, Norvegio; tel. (472) 448085.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri administrado, komerco, industrio kaj diskonigo de la agado de UEA: E.L.M. Wensing, Dennenstr. 9, B-3581 Achel, Belgio; tel. (011) 643150.

Estrarano pri la delegita reto, rilatoj kun Esperanto-organizaĵoj kaj pri specialaj agadoj: D-ro P. Denoël, rue Victor Raskin 20, B-4000 Liège, Belgio; tel. (041) 270079.

Estrarano pri kongresoj kaj konferencoj: D-rino F. Szabó-Felső, Várady A. út. 4, H-7621 Pécs, Hungario; tel. (072) 16725.

Estrarano pri informado kaj turismo: S. Świstak, ul. Racławicka 10m 11, PL-30-075 Kraków, Pollando.

Estrarano pri financo: E.J. Woessink, Onder de Beumkes 29, Velp-6200, Nederlando; tel. (085) 137412.

Pensoj pri la Esperanta literaturo

FARI BILANCON de la tuta literaturo estas tasko, kiu ĉiam tentas la kritikistojn, tamen homoj prudentaj emas kontraŭstari tiun tenton. Ja pritakso de la momenta situacio de la Esperanta literaturo ebligas al la kritikisto senti sin sol sola mastro kaj juĝisto de vasta trezoro; samtempe, tiu tasko ankaŭ minacas lin fariĝi orgojla diktatoro. Tamen, formetinte mal-kuraĝon (kaj eble modestecon) eblas alfronti la taskon. Pasis jam 23 jaroj de post la apero de *Kvaropo*, libro, kiun oni konsideras la uverturo al la tria periodo de la Esperanta literaturo. Longa tempo, preskaŭ kvarona jarcento. La unuan jardekon de tiu ĉi periodo karakterizas florado kaj stampas la seninterrompa agado de tri ĉefaj literaturaj forumoj: la eldonejo Stafeto, kaj du periodaĵoj — *La Nica Literatura Revuo* kaj *Norda Prismo*.

Tiu ĉi unua jardeko alportis konsiderindajn rezultojn: aperis pluraj gravaj talentoj, kaj la nivelo de la pintaj produktoj signife altiĝis. La Esperanta literaturo kaj laŭ nivelo, kaj laŭ siaj temoj kaj mondrigardo proksimiĝis al la kuntempa mondliteraturo. La lingvo-evoluigo, kiel ĉefa tasko ne plu premis ĝin, kaj tio permesis al la aŭtoroj disvolvi pli libere sian individuon. Samtempe la traduka literaturo perdis el sia antaŭe ĝuita troa graveco, ja la literatura lingvo kaj poetika normaro estis kreitaj.

Tamen, apud la pozitivaj fenomenoj jam tiam aperis negativaĵoj. La kvalita diferenco inter poezio kaj prozo plu kreskis, eĉ, la prozo komencis malprogredi ankaŭ kvante. Tiuj fenomenoj efikis malavantaĝe al la legatenco de la literaturo, ja la legantaro devis elekti inter abundaj altkvalitaj poeziaĵoj (kiuj estis digesteblaj nur por malmultaj) unuflanke, kaj aliflanke malmultnombraj kaj ĝene amatoraj kaj enuige naivaj aŭ nebulecaj prozaĵoj (por kiuj oni bedaŭras malŝpari la tempon).

Tiu tendenco eĉ pli fortiĝis en la sesdekaj jaroj, post la malapero de *La Nica Literatura Revuo*, kaj precipe fine de la jardeko, pro la stumblado de *Norda Prismo* kaj longaj paŭzoj ĉe Stafeto. La literaturaj centroj malaperis, kaj la literaturon ekminacis mal-integriĝo.

En la nuna momento tiu malintegriĝoplu daŭras. Mankas literaturaj metiejoj: Stafeto ŝajne vegetas (la lastaj novaperaĵoj el la plumo de Beaucaire kaj Gabrielli-Walraamoen montras doloran malprogreson de literatura pretendemo), *Literatura Foiro* kaj *Hungara Vivo* faras strebojn respektindajn, sed ĝis nun ili ne plenumas tian rolon. La eldonado montras ĝenan kapricecon, ofte aperas verkoj sensignifaj, dum la 700-paĝa originala romano de J. Francis, *La Granda Kaldrono* atendas eldoniston jam almenaŭ dek jarojn. Tamen ne mankas ankaŭ kelkaj fenomenoj pozitivaj. La plej grava el ili estas la reeldonado de pli fruaj verkoj, kio iom post iom ebligas al la publiko konatiĝi kun la ĉefaj verkoj de la Esperanta literaturo de pli fruaj tempoj. Tio estas ege grava el la vidpunkto de la estonto ankaŭ, ja nur tiel povas formiĝi iaspeca esperantista "kultura konscio", nur tiel la publiko povos rigardi la Esperantan literaturon kiel "aŭtonoman organismon", organikan tuton, kaj ne simple sinsekvantan vicon de esperantlingve verkitaj libroj. Elstaras inter la represaĵoj la reapero de la kompleta *Literatura Mondo*. Tiuj ses dikaj volumoj el Japanujo permesos al ni senpere aliri kaj utiligi la rezultojn de tiu valora literatura periodo inter la du militoj, sed ankaŭ forblovos certajn neutilajn legendojn kaj falsan aŭreolon. Ni esperu tamen, ke la represo de la malnovaj verkoj ne daŭre flankenŝovos la multe pli riskan entreprenon eldoni novajn kontribuaĵojn. Estas multe laŭdinda la agado de Dansk Esperanto Forlag, kiu dum la lastaj jaroj — apud gravaj represoj — kuraĝe eldonis plurajn originalajn prozvolumojn, ofte el la plumo de debutantaj aŭtoroj.

Alia pozitiva fenomeno, kiun fakte ebligas la reapero de malnovaj verkoj, estas la komenciĝanta serioza esplorado de la Esperanta literaturo. Tiu ĉi esploro devos konduki al la klara konceptado de ĝia destino, ĝiaj funkcioj. (Modestan provon por tio mi jam faris antaŭ tri jaroj, sed seneĥe, vd. *Hungara Vivo* 1972/73.) Certe neniu volas kontraŭi, ke ĝiaj funkcioj grave diferencas de tiuj de la naciaj literaturoj.

Estus bone scii, ĉu la ŝanĝo de la juĝkomisiono ĉe la Belartaj Konkursoj kondukos al la dezirataj post-sekvoj? Eble jes, sed en si mem la ŝanĝo valoras neniom, se la monsumo de la unua premio daŭre restos 100 guldenoj (dujara membrokotizo de UEA!), kaj se la verkoj aperos nur kun granda prokrasto (se entute ili aperas!).

Estus ideale, se UEA povus fariĝi la plej forta Esperanta eldonejo, sed verŝajne ĝiaj financoj ne baldaŭ ebligos tion. Tamen, ĝi povus helpi la agadon de la esperantaj eldonejoj per starigo de komisiono el literaturaj ekspertoj, kiu prilaborus gvidprincipojn, rekomendojn por la eldonagado, kaj starus je la dispono de la eldonejoj ankaŭ koncerne konkretaĵojn, ekz. ĉe prijuĝo de manuskriptoj.

La Esperanta literaturo bezonas atenton flanke de la movadaj instancoj. Ni esperu, ke tiu ĉi speciala numero de la revuo Esperanto estas la unua manifestiĝo de tiu atento.

ARISTOFANO:

Laŭdo al la paco

(Elĉerpaĵoj el la komedio "Paco")

La kamparano Trigaeo, laca de la longa milito, flugas ĉielen sur skarabo, kaj kun la helpo de Hermeso kaj ĥoro de farmistoj savas la diinon Paco el la kaverno, kie tenas ŝin Milito.

Versoj 551 - 581:

- Trig. Popolo, aŭdu! La farmistoj iru
Tuj kun ilaro al kamparo sia,
Nun sen glavo kaj ĵetiloj, haste kiel eble plej,
Ĉar ĉi tie floras Paco, kiel pasinteco ne.
Ek do al kampar-laboro post triumfa kant-ulul'!
- Ĥor. Ho vi tago sopirita de farmisto kaj justul',
Ĝoje al la vinberejoj nun mi volas turni min,
Al de mi plantitaj figoj antaŭ jaroj tridek kvin,
Por saluti ilin ĉiujn post multjara malatent'.
- Trig. La diinon laŭdu, homoj, per sincera komplement'!
Dank' al ŝi la ŝild-devizoj kaj kask-plumoj estas for.
Poste ni rapidu hejmen al bieno kaj labor'
Kun haringo pli bongusta ol soldata porcium'.


Her. Ho Pozejdon', kiel bela estas la spektaklo, dum
Dense vicigitaj ili brilas kiel festa kuk'!

Trig. Kompreneble tra la jaroj polurite per la tuk',
La pioĉoj kaj forkegoj fajre flagras en la sun'.
Ho la intersulka grundo, kiel ĝi profitos nun!
Ankaŭ mi reiri volas al la kara kamp-rutin'
Kaj denove sarki mian bieneton — ho finfin'!

Memorante, ho amikoj,
Pri antikvaj ĉi praktikoj,
Kiujn donis la diino,
Pri la dolĉe mosta vino,
Pri la kukoj fig-premitaj,
Pri la figoj bonkvalitaj,
Pri la mirto kaj violo —
Bedo ĉe la puta kolo,
Pri revataj la olivoj, —
Pro ĉi tiuj do motivoj
Danku la diinon nun!

Versoj 974 - 1000:

- Trig. Ho reĝino, nobla diino,
Plej impona moŝto, ho Paco,
Kies la danca kaj nupta rutino:
Al vi plaĉu nia donaco!
- Ĥor. Jes, akceptu tion, Madono,
Kaj ne faru kiel kutimas
In' malĉasta ĉe la bezono:
Tiu ŝtelrigardi ne timas
De fermita nur je duono
Pordo la straton, kaj se esprimas
Viro ŝaton pri la propono,
Ŝi retiriĝas; se ne, ŝi limas
Gvate denove. Laŭ ĉi admono
Vi ne tiel nun pantomimas.
- Trig. Male, vin montru (tute, ne pece!)
Al ni amantoj sinjorinece,
Kiuj jam dek tri jarojn suferas,
Dum vi el nia mond' malaperas.
Metu nun finon al la milito
Kaj batalekrioj! Estu "Benito"
Nomo honora, ne hiperbola!
Faru, ke ĉesu farso parola
Ĉirkaŭ la tablo de intertraktoj!
Timon komunan pelu la faktoj!
Forĝu nin, ĉiujn Grekojn, laŭpove



Jam de l' komenco, freŝaj denove;
Dozon da amo grandan infuzu,
Kaj pardonemon mense difuzu!
Lasu, ke nia pleba bazaro
Pompu per ĉiu speco de varo:
Ajlo, granatoj, pomoj, kaj figoj,
Eĉ manteletoj po dek pfenigoj.

Versoj 1127 - 1173:

Ĥor. Kiel ĝojas mia koro!
Jam ne plu la kepo,
Nek soldata plu deĵoro,
Nek fromaĝ' - kaj - cepo.
Ĉar batalojn mi ne ĝuas;
Plaĉas pli salajro,
Dum amikoj rendevuas
Ĉirkaŭ hejma fajro:
Kiam sekaj ŝtipoj krakas
(Uzu ja someron!)
Kaj la gaja flamo bakas
Glanon aŭ kikeron;
Dum ni vete drinkas vinon,
Kaj por akompano
Ŝtele kisas la sklavinon
Dum l' edzina bano.

Ĉar nenio pli agrabla estas ol seminte, jen
Vidi tuj pluveton fali kaj aŭskulti dum promen':
"Hej amiko, kion fari indan je ĉi tiu tag'?"
Mi proponas, ke ni drinku danke pro la dia ag'.
Vi, edzin', da fazeoloj tostu tuj mezurojn tri,
Almiksante da tritiko; prenu figojn tiujn ĉi,
Kaj vokigu la sklavinon, ke ŝi hejmen venu tuj,
Ĉar ne eblas plu hodiaŭ tondi ĉe la vinberuj',
Nek prifosi la radikojn, ĉar la ter' malsekas plu."
"Kaj de mia hejmo venos turdo kaj fringeloj du;
Kaj troviĝas eĉ kolostro tie kaj leporoj kvar,
Se la kato pasintnokte ne forportis ilin, ĉar
Iun bruon kaj raspadon tamen aŭdis tie mi.
Unu por la patro, sklavo! La ceterajn tri por ni.
Petu ankaŭ al najbaro mirto-branĉojn kun la flor',
Kaj dumvoje vi invitu ankaŭ Ĥarinadon, por

Ke al nia simpozio
Li rapidu veni,
Nun ke volas bona dio
Niajn kampojn beni."

Kiam ajn la dolĉa kanto
De l' cikado sonas,
Kiel sperta intendanto,
Zorge mi spionas,
Ĉu vinberoj jam maturas
(Frumatura speco),
Ĉu la figoj ŝvel-veluras
(Trompa tiu eco!).


Kaj post moliĝado, dentoj
En la pulpo plaŭdas;
Kaj per multaj komplimentoj
Mi la diojn laŭdas.
Poste por stomaka sano
Mi dekokton faros
Per pistita timiano;
Kaj se vi komparos,

Nun mi estas grasa pli ol kiam kolonelo (fi!)
Kun plumkasko kaj mantelo ruĝa staris super mi.

Versoj 1320 - 1328:


Trig. Dion preĝe ni instigu,
Ke Grekujon li riĉigu,
Ke hordeo multe kresku,
Vino lume fosforesku;
Ke ni multajn figojn manĝu,
Kaj edzinoj daŭre ŝanĝu
Vindotukojn de la idoj;
Sume, ke aŭdiĝu ridoj
Pro la retrovita ben':
Al la paco nun — Amen!

Trad. D.B. Gregor



WILLIAM
AULD:

Letero al William R. Harmon



Kara Vilĉjo,

Sidante en vesper' trankvila,
kun *ĝin-toniko* ĉe la mano,
vian leteron traleginte,
bildigis mi sur mens-ekrano
la mondon kaj la mikrokosmon
de tiu mondo: la Movado,
en kiuj lastatempe rolis
la revolvero kaj la spado
pli ofte ol la frata sento,
pli laŭte ol la forta voko:
kaj tio rezultiĝas, vere,
el karaktero de l' epoko.

Do prenu glason da viskio,
kaj mobilizu paciencon
dum mi per kelka cerbumado
en miaj sentoj serĉas sencon.

Profeti estas senprofite.
Feaj donacoj ĉiam trompas.
Midaso malsatmortis poste.
DDT vivoĉenon rompas.

Reformo kaj revolucio
atingas celojn laŭ la plano:
se poste tamen la socio
ne iras ĝuste laŭ slogano,
ĉu vi rimarkas, ke la kaŭzo
de novaj ĝenoj estas fakte
ŝanĝiĝo de l' antaŭa stato —
ŝanĝita nepre ne ekzakte?

"Intencoj bonaj la inferon
pavimas". Kaj la reformuloj
reformas bonintence ion
per longa strebo laŭ formuloj,
kiuj jam ne plu aktualas
en la momento de l' sukceso —
ĉar intertempe evoluis
la cirkonstancoj en proceso
centmil detalojn ampleksanta.
Kaj rezultiĝas aŭ infero
aŭ minimume nova stato
sur reformenda Nova Tero.

Fu! Kion fari? Ĉu rezigni
pri ĉia revo kaj aspiro?
Se rezultiĝas el la lukto
ne utopi' de l' pioniro
sed io tute ne planita,
nu, inversigo de l' atendoj —
ĉu ne pli bone ne miksiĝi
en tian kaĉon de pretendoj?

Mi ja ne ŝercas. Ĝenerale
la homoj levas karabenojn
kaj en tendaro de l' Libero
forĝas pli firme la katenojn;
aŭ ĵetas for limigajn morojn
laŭ ili ne plu adekvatajn,
kaj trafas baldaŭ en aŭsterojn
jam ne publikajn, sed privatajn;
kaj bonaj homoj, sub la premo
de la maljustaj ekspluatoj,
forpelas siajn mastrojn fiajn —
kaj jugas sin por psikopatoj.

Kaj tial, en l' epoko nuna,
(la regno de l' Ekonomio),
eksmode estas, okupiĝi
pri Arto kaj Filozofio,
ĉar ili havis siajn ŝancojn
("epoko ora", kiu pasis
en mondmilitoj, diktatoroj
kaj optimismo kiu strasis).

La mondon regas la salajroj,
la prezoj, inflacio, dungoj —
ĉu prave? Nu, kelk milionoj
vivnutron gratas per la ungoj,
dum pli feliĉaj, sate sataj,
en landoj "pli evoluintaj",
ankoraŭ estas malkontentaj
pro la volviĝoj labirintaj
de monsisistem' nekomprenata —
nekomprenebla, mi supozas,
krom de manipulistoj, kiuj
riĉigas sin dum mi almozas.

Nu jes, sed mankas okulfrape,
en ĉi ĝangal' materiisma,
inspira ideologio
kunliga (krom la ŝovinisma
entuziasmo de nacioj
"malmergiĝantaj" el "mallumo"
de sia propra mezepoko,
ardantaj je potenc-gustumo —
kaj tion ni ne povas sperti,
ĉu ne, ĉar ni jam tion pasis,
kredinte, ke la evoluo
tiun stadion jam frakasis . . .)

Ho naivuloj, kiuj kredas
pri l' gefrateco de l' homaro,
dum sekto kontraŭ sekt' militas,
najbaro kontraŭ la najbaro!

Koncepton internaciecan
retrovis la jarcent' dekoka;
ĝin poste vartis filozofoj,
poste la Majstro Bjalistoka;
kaj post l' Unua Mondmilito
amasmovado sociala
agnoskis ĝin — almenaŭ buŝe —
por la socio ideala:

"Jam unuiĝu laboristoj
de l' tuta mondo!" — Ĉu hodiaŭ
aŭdiĝas ie kri' simila,
ĉefbazo de revoluci' aŭ
la signalvorto de reformoj?
Kontraŭe. Ĉie ŝvebas plage
miasmo de l' "fier' nacia";
gangsteroj regas nin Ĉikage,
teritoriojn siajn gardas
dum pagas ni "protekt-imposton".
Kaj Kavaliroj de l' Espero
en siaj vejnoj sentas froston.
Dirinte tion — ĉar ĝi ŝajnas
al mi sufiĉe realeca —
mi ja ne volas prezentiĝi
kiel Kasandro fataleca,

ĉar se malhelpas la Movadon
manko de preta mondvizio,
kompanse eble la praktikaj
postuloj de l' Ekonomio
por ni laboras en la nuno,
kaj Esperanton oni prenos
finfine kiel nuran ilon —
kaj homoj homojn jam komprenos
laŭ rev' kaj celo zamenhofaj,
sed sub la premo de "neceso"
anstataŭ sub Standardo Verda
je sankta nomo de l' Progreso.
Eble. Sed jen min jukas strange
dubeto pri ĉi solvo bela:
ĉu vere la praktiko premas
per nepra postulado cela?
Jen penso, kiu min obsedas:
se ĉiu komencint' ellernus
la lingvon, jam delonge lumo
de l' Venko tra la mond' lanternus.
Sed kia estas la realo? —
Nur tre malmultaj sin dediĉas,
el tiuj miloj, al l' Afero.
Apenaŭ tiu grup' sufiĉas
vivteni nian lingvon, tamen
ĝi ja ekzistas. La klarigo?
Mi kredas, ke **idealismo**
estas la fonto de instigo.
Jes, "familia rond'", "Interna
Ideo" — tuto de l' falbaloj
— en tiu formo aŭ alia —
jen la labormaterialoj.
Nu, Vilĉ', *vi* estas praktikulo,
sukcesa en komerca sfero:
ĉu vin, ekzemple, la motivoj
pratikaj ligus al l' Afero?
Neeble! Ĉu do, forĵetinte
verdstelojn desur kalsoneto,
ni ankaŭ bonajn sentimentojn
tro proskripciis en kompleto?
Do — for la spadojn, for pistolojn?
Nu jes, sed temas ne pri tio:
temas, ke ni mem avangardu
konscie pri la mondvizio,
kaj kriu laŭte tra la mondo —
kun digno, tamen, kaj sincero —
ke Esperanto estu lingvo
por homaranoj de la tero,
ke nur neŭtrala Fundamento,
kaj tiel plu — vi bone konas;
kaj tiel eble ni allogos
la homojn, kiujn ni bezonas.
He, kara, vidu — al ekstazo
kondukis min la *ĝin-toniko!* —
Pardonu (jes, **samideane**)
la naivaĵojn de l' amiko,

Vilĉjo.

WOUTER
PILGER:

Tri poemoj

POETO PRAKTIKA

Ĵus telefonis redaktoro
ĉu mi ankoraŭ povas kontribui
poemon por lia revuo.
Respondo devis esti ke
ĉe mi en hejmo ne sufiĉas
tirkeston tiri por trovi poemon.
Kutime mankas la legantoj
kaj poemo ja estas komunikaĵo
do nepre mi prokrastas ĉiufoje
ĝis venas peto, kaj mi skribas
kun nur espero ke rezultos poezio.

Traduki poezion min defias
ĉar formon, ritmon, eĉ la stumblojn
iu alia jam difinis: mi nur rajtas
redoni ĉion plej fidele
ne perfidante la aŭtoron.
Do eĉ se ne estos leganto
traduko kontentigas la bezonon
konvinki min ke mi kapablas.
Sed verki mem estas io alia
ĉar ĉiam kun krajono en la mano
mi pensas: kiu ĝin ja legos?

Kion en esperantolando
poeto faru kun siaj produktoj
krom partopreni en konkursoj
aŭ publikigi en klubaj gazetoj.
Mi partoprenis foje kaj mi gajnis
pokalon kaj pentraĵon kun valoro
de ducent mil italaj liroj
sed ne la monon por tien vojaĝi.
Pokalon do ili ne sendis
pentraĵon jes, kiel presaĵon.
Kion nun pensu mi pri la valoro?
La prezo de la pano ĉi-semajne
denove je tri cendoj plialtiĝis.
Pri margarino mi eĉ ne parolos.


RIMOJ

Edzino mia min demandis:
ĉu poezio do ne devas rimi?
Ĝis nun mi nur senrime dandis
kaj timis ke finfine mi nur ŝlimi
kapablos se nun ankaŭ mi ekuzos
la rimoskemojn laŭ la libroj,
ke vortelekton rimoj nur ekskuzos,
ke rime ne streĉiĝos ĉiuj fibroj
de la enhava arteksaĵo,
ke en la koro ne ektrilos vibroj.
Por provo-pruvo: jen rimaĵo.

URBOPLANADO

Ofice mi hodiaŭ okupiĝis
pri projektado de urbo
surpapera nur, ne por loĝi
en kiu homoj renkontiĝu
bicikle, aŭte, ĉe kruciĝoj
kaj havu problemojn
pri cedado en trafiko
por tiel lerni la regulojn.
Mi ne sukcesis, ĉio iras glate.
Do kial matene mi ne povas
atingi mian oficejon
sen koleriĝo?

Wouter Pilger



KAROLO
PIĈ:

Romeo kaj Frina

FRINA KUŜAS en neĝe blanka lito. Ŝi estas dudek-trijara kaj ŝi rememoras. Antaŭ unu jaro ŝi festis sian nupton. Ŝi edzeprenis profesoron de komparistiko. Kvardekjaran profesoron! Sveltan ulon kun penetremaj bluaj okuloj. Ledan patronon, iom glacian kaj ĉiel seriozan. Nealireblan. Kaj ŝajne malvirineman.

Ŝiaj amikinoj ŝin avertis. Ili pentris al ŝi la inferon, kiu ŝin atendas ĉeflanke de li. Ŝi rekonadis iliajn admonojn kaj oponojn. Ŝi rekonadis ĉion. Sed samtempe ŝi sentis sin strange altirata al li. Kaj iutage okazis tio, kio estis okazonta. Ŝi estis lia.

Kaj nun do ŝi kuŝas en ĉi tiu blanka lito, en ĉi tiu dormoĉambro, en ĉi tiu vasta, senbrua vilao, kiu estas ŝia, kaj — ŝi atendas. Kion? Ŝi mem ne scias kion! Ĉion! Kaj nenion! La edzo estas for. Kie? Ĉu ŝi konas? Li ne emas diradi tion. Eĉ al ŝi ne! Li tute ne emas diradi ion. Antaŭ unu jaro tiu ekkono preskaŭ ŝokis ŝin. La avertoj de la amikinoj subite ŝajnis ricevi malagrablen klarajn kaj difinitajn liniojn kaj konturojn. Tiam, unuafoje, ŝi eksentis kvazaŭ timon. Kaj sekrete ŝi ekploris. Pretere, tio estis ŝia unua edzina ploro. Feliĉe samtempe la lasta! Ĉar ŝia profesoro . . .

Sed ĉi tiam Frina ekkriis kaj abrupte rektiĝis. Ŝtoneto frapis fenestran vitron. Angoro trakuris ŝin. Kio? Kie? Ŝi volis voki. Samtempe tamen ŝi tuj ekkonsciis la profundan vanecon de tio. Ŝi ja estas tute sola en la domo! Kaj nun jam alia ŝtoneto ekgrincis sur la fenestra tabulo. Kiu idioto! Li ankoraŭ frakasos la vitrojn! Kolerego ĵetis ŝin el la kusenoj. Ŝi saltis al niĉo kaj malfermis la fenestron.

Antaŭ ŝi, sube, kuŝis la ĝardeno. Frinan ĉirkaŭblovis ebriiga bonodoro de printempa nokto. Kaj samtempe tie malsupre, en la mallumo, ia voĉo diris: "Frina . . .". Nekonata voĉo.

Frina ektremis.

"Kiu vi estas? Kion vi volas? Kion vi faras en la ĝardeno nun, postvespere, dum malfrua nokto? Mi vokos mian edzon! Tuj!"

"Ne voku lin, Frina!"

"Mi vokos! Kaj — kiu vi estas?"

"Mi devas diri al vi ion!"

"Parolu do! Vigle kaj rapide! Kion? Mi aŭskultas!"

"Mi amas vin, Frina!"

Frina rigidiĝis.

"Mi amas vin jam longan tempon, Frina! Bela Frina! Ĉarma Frina! Diina Frina! Alloga Frina!"

Frina volus protestegi. Frina volus ekkoleri. Sed anstataŭe Frina nur tremetas. Ĉu pro la blovoj de la nokto? Bela Frina. Ĉarma Frina. Diina Frina. Alloga Frina. Tiuj apeloj al ŝia ravo ŝin senfortigas kaj malarmas. Ili estas evidentaj serpentaj parolaĉoj. Sed ankoraŭ ĉiam ili efikas. Jam ekde la Paradizo! Danke al dio!

Kaj tiu tie sube scias tion. Kaj li senhonte tion misuzegas.

"Bela Frina . . ."

"J-j-j-es . . . ?"

"Esti kun vi! Kaj sur vojeto promeni. Granda peka peto! Senti en si mil ŝaŭmajn sukojn. Malfermi ĉiujn viajn bukojn. Esti senmorta. Esti tempo. Esti la vivo kaj printempo. Kaj esti sablo, kiu miras, dum viaj kruroj sur ĝi iras!"

"Vi klopodas vane! Nenion mi aŭdas!"

"Dolĉa Frina . . ."

"Ne . . ."

"Aĝa serur'. Malŝlosu ĝin! Mi volus, volus kisi vin. Ĉiam post tago iras tag'. En parko floras jam kratag'. Aĝa seruro. La ŝlosil' perdiĝis ie sen util'. Ĉu vera am' aŭ nur komplez'? Aŭskultu iom! Noktomez'!"

"N-n-n-ne . . . ! Mi ne povas aŭskulti!"

"Vi estas juna, sinjorin'! Mi volus, volus preni vin . . . Ho, reciproka interkroĉ'! Aŭdu! Jam sonas sunhorloĝ' . . ."

Kaj poste la admona, defia voĉo venas ĝis la fenestro. Frina vidas nenion. Estas tro mallume. Kaj, cetere, ŝi jam estas same malforta por resti kiel por forkuri.

Kaj tial ŝi nur staras kaj ne movas sin. Nevidebla ombro transŝovis sin enen. Ŝiaj dentoj komencas klaki kiel sub atako de febro aŭ malvarmo. Ŝi eligas neartikigitajn veajn sonojn. Bedaŭrinde ili estas tro mallaŭtaj por fortimigi lin. Kaj krome ŝi eĉ ne scias, ĉu efektive ŝi deziras fortimigi lin. Ies manoj tuŝas la ŝiajn. Kaj la insista, hipnota voĉo plu tentas kaj delogas.

"Steloj sur bukloj de harar'. Kaj lum' en via okulpar'. Viajn ovalajn ŝultrojn preni. Vin turni, viajn manojn teni. Silenti. Kaj nenion diri. Tra parko kun vi promeniri. Kuraĝi eĉ ĝis unu tuŝ'. La buŝon doni al la buŝ' . . ."

Kaj ĉe tiuj vortoj lia buŝo vere algluiĝas al la ŝia. Momenton ŝi eltenas tion kaj eĉ ne defendas sin. Poste ŝi provas repuŝi lin. Sed ŝia provo estas febla kaj malforta kaj ĝi fiaskas povre kaj mizere.

Kaj li plu parolas.

"Nur unu vian kison fraŭdi! Ĉielkontakt'! Kaj poste aŭdi, kaj poste scii, sinjorin', ke ankaŭ vi tre amas min!"

”Sed mi ja ne amas vin!” ŝi indigniĝas.

Bedaŭrinde ankaŭ ĉi tiu ŝia deklaro sonas false kaj neverŝajne.

Kaj la voĉo plu recitas.

”Hodiaŭ luno ne opalas. Nur viaj inaj mamoj palas. Kaj vent’ sub vian jupon blovas. Femuroj du sin ritme ŝovas. Unu kaj unu svelta krur’. Du ŝtrumpoj frotas sin. Susur’. Kantanta karn’. Kantanta silko. Paro da mamoj. Luno. Pilko. La vento viajn silkojn rastas. Viaj ĵarteloj vin balastas. Forĵeti ĉion! Febro. Garne kuŝu la nuda karn’ surkarne!”

La nevidebla viro, centimetron post centimetro, premas ŝin enen, pli internen en la ĉambron, pli proksimen al la lito.

Ŝi jam scias, kio sekvos. Dekomence ŝi sciis, kio sekvos, kiel ĉio ĉi finiĝos. Ŝi provas la lastan kontraŭstaron. Kiam la viro ĉirkaŭprenas ŝin, ŝi ekmordas lian brakon. La viro eksiblas pro doloro. Sed poste li mergas sian vizaĝon en ŝian densan, odorantan hararon, kaj komencas kisi ŝin, delikate, longe, malsate. Tio ŝin kortuŝas. Ankaŭ ŝi donas al li kelkajn kisojn.

Kaj li flustras al ŝi.

”Maturaj mamoj sub mamzon’. Falas la ŝtrumpoj kaj kalson’. Elastaj koksoj. Nuda sin’. Nuda, senvesta sinjorin’.”

Dum tiuj vortoj liaj manoj glitas sur ŝiaj koncernaj virinpartoj.

”Femuroj. Svelta korp’ diina. Harplena ventro halucina. Mi vin deziras. Jes! Nun! Tuj! Ĝojon al via voluptuj’!”

Kaj li kaptas ŝin. Ŝi ekĝemas. Ŝi elstreĉas sin kiel palmo aŭ pafarko. Ŝi tremegas. Ŝi ondas. Longaj, elastaj konvulsioj trakuras ŝian korpon kiel ekblovoj de nevidebla vento. Kaj li levas ŝin kaj portas ŝin en la liton.

Sed antaŭ ol uzurpi ŝin, li ankoraŭ certigas al ŝi:

”Ĉu vi pekos, ĉu vi pentos, mi ne diros, mi silentos!”

Kaj tiam Frina puŝiĝas al li en freneza alpremiĝo, kvazaŭ tiuj vortoj estus defio aŭ — devizo.

* * *

Kiam ŝi apertis la okulojn, estis jam mateno. Ŝi estas laca kaj feliĉa. Ŝi manas apud sin. Ŝi manas en malplenen. Iom ŝi embarasiĝas kaj videble malĝojiĝas. Sed tiam malfermiĝas la pordo kaj envenas ŝia edzo.

”Frina!” li diras kaj klinas sin al ŝi.

”Kiel vi dormis?”

”Bone! Eĉ bonege!”

”Ĉu vi estis fidela al mi?”

”Perfekte, mia kara!”

”Ĉu vi ne mensogas?”

”Eĉ ne iom!” ŝi koketas.

Kaj poste, abrupte, ŝi suprenŝovas la maldekstran manikon de lia ĉemizo. Sur lia brako bluas, ruĝas, verdas brulaj postsignoj de sovaĝaj, pasiaj virinaj dentoj.

Ŝi brakumas lin, singultas, kaj detiras lin en la liton.

”Amu min! Amu min!” ŝi ĝemegas ”Ankoraŭ unufoje! Kaj ripetu . . . ”

”Kion mi ripetu?”

”Tion! Vi ja scias! Tion!”

”Ĉu vi pekos, ĉu vi pentos, mi ne diros, mi silentos!”

”Jes, tion! Kaj ĉion!”

”Kiel vi ekkonis min . . . ?”

”Jam dekomence mi suspektis. Tamen kiam vi flustris al mi tiun ”Ĉu vi pekos, ĉu vi pentos, mi ne diros, mi silentos”, subite mi estis tute certa!”

”Sed ja . . . ”

”Ĝi sonis al mi kiel malproksima antikva reeĥo, kiel fora akordo el la ankoraŭ pli fora Marcialo, mia kara, stulta, malprudenta komparisto! La mondo estas jam tro aĝa. Tial ne plu eblas esti originala. Sed konsoliĝu! Vi donacis al mi almenaŭ ĉiel originalan travivaĵon. Unu plian grajnon el la fantazia rozario de viaj bubaj kaj junecaj ŝercoj kaj surprizoj. Kaj tio validas pli ol ĉia ajn literaturo. Kaj via adulta kaj tamen neadulta sinjorino dankas vin por tio!”

Kaj kiam li provis ion kontraŭdiri, ŝi sigelis lian buŝon per longa, longega arda kiso.



EDWIN
DE KOCK:

Polucio

1. PROGRESO

La homo estas lerta;
La hom' ne povis kontentigi
je prabezonoj, nuraj vivnecesoj,
sed inventadis
dezirojn hodiaŭe novajn.

Por appetit' enorma kiel la jarcento
al si li konstruadas
fabrikstomakojn, ĉiam pli grandajn,
kaj nutras daŭre
malvirtojn de la sango
kontraŭ la malamikoj,
kaj si mem.

Rongantaj minoj
priŝtelas la futuron,
krudaĵajn ŝparskatolojn de la poste-
infanoj larmaj kaj koleraĵ, [uloj,
la multaj iam naskiĝontaj,
supozeble.

Tra tagoj da fumado,
en la fulga fundo de fajrerŝprucaj
seninterrompe [noktoj,
metalintestoj bruas,
digestas.

Aŭskultu! La fabrikoj
plenfurzas la aeron,
sur ĉiuj bordoj
senhonte kaj publike
urinas en la maron kaj riverojn
kaj ĉie sur la planedvizaĝon fekas.
Ho spiro, trink' kaj sufokiĝ'!

2. AL LA INDUSTRIISTOJ

Dum du jarcentoj
da misindustriigo
poetoj — ĉar instinkte sciaj
(ĉi pesimistaj najtingaloj)
pri la homeco,
pri malpuraĵo, fum' kaj radoj —
vin avertadis.

Lertavide materiismaj,
vi ilin malamegis,
pli bone sciis, skeptikante
pri la arbar' kaj riverega fulgo
kaj ĉi eksbluo super niaj urboj;
ĉar afere vi estis ja praktikaj
kaj ili. . . romantikaj!

3. SENBRIDECO

Malgraŭ sarkaĵoj kaj serpent' kaj ĉio,
la tero tamen 'stis al ni Edeno,
freŝakva, bonaera kaj purgrunda;
sed post laŭgrada, dujarcenta fio
fumaĉe nin inundas nun geheno.
Ĉu restu de ti' tuta dolĉ' abunda
nur rekremento, feĉo kaj skorio?

4. EVOLUO


Hebreoj emociaj.
Poetprofetoj flamokulaj
kun nigrabarba diinstinkto.
Profundoj kaj kulmin' Jesua.
Cerbaj helenoj. [marŝo.
Kitonaj pensoj en ĝardene kalma
Glorlokoj kiel Salamiso, akropolo.
Kaj ni. Ni 'stas precipe la stomako,
kompetento de suk' digesta.
Planedkadavro.

5. RAKONTO

Tiel estadis, iam.
Mi ne mensogas.
Aero freŝa, hobojspira,
sana akvo super videblaj fundoj,
pradolĉa,
kaj terodoro
dum la krepuskserenoj,
kiel faldoj de ies robo
tra roso inter lilioj susurantaj
en ĉi ĝardeno de l' Sinjoro.

6. PROBLEMO

Reĝina rozo de ti' ĝardenhor'
parfumkalme per flava velurhaŭto
ektuŝis triumfete. Kial paŭto
poste tiom perturbas, ĉi horor'
menskria ĉe pas' de benzinrukta aŭto?



Parkmomentoj

Tago da urbobildoj, polva bruo.
La kor' ĝispalpas sian finan benkon
inter ĉi infanar' ludanta, kiu
neniam plenkreskulos nek forlasos
la parkon iam.
Realtrudas sin
la longe forlasitaj, sangkaraj stratoj
kaj la alia luno, en la menso,
en Preskaŭlando ki' neniam estis.
Ho regionoj, tiom da unu homo!
Preter penspiedetoj kaj ĉi heĝo
la morgaŭmondoj — kiaj postulatas —
invitas min, insidaj glandoflusto;
sed sub ĉi vastaj branĉoj de l' mo-
mento,
el ĉia historio eskapinte,

el ĉio ki' turmentas, mi rifuzas
antaŭen eksterirojn, krakpaŝas enen,
retro kaj koroblikve, ĝis la bosko
kie neniam mia korp' ankoraŭ
figuropremon metis al la musko
sub frondkradetoj. Noktfloroj
ebriigas.

Apertaj, rebrilplenaj, la okuloj
rigardas larĝon de mirinda luno.
Feliĉe, ke ni tamen konstruadas
en polvaj urboj inter jarkonfuzoj
ĉi verdajn parkfokusojn de silento.
La benko mordas mian sidon. Tamen
momenton mi meditas, reveninto,
nu . . . mensludon. Kaj ĉirkaŭ mi
infanoj.

REDAKCIA NOTO: Elizio spertis apartan pritrakton jam en la lasta el la kvar libroj de E. de Kock — *Kvin elementoj* (1970). Ne temas nur pri klopodoj revivigi la eliziadon de *e ĉe estas* = '*stas*', sed ankaŭ pri aliaj licencoj nekutimaj, kiel ekz. ellaso de apostrofo kiel signo de elizio: *suk* = *suk'*, *trink* = *trink'*. Tamen, la poeto komencas elizii la lastajn vokalojn ankaŭ ĉe korelativoj (v. ĉi-supre: *ti'* anstataŭ *tiu* en la poemo "Senbrideco" kaj *ki'* anst. *kio* en la poemo "Parkmomentoj"). De Kock ekkutimas kunigi la prepozicion *de* kun la elizie kripligita artikolo *la* = *del* (tiel, sen apostrofo). Pro la fakto, ke nian revuon abonas ne nur beletremuloj kaj, cetere, pro la art. 5 de la Statuto de UEA, ni aŭdacis — kun pardonpeto al la aŭtoro — almenaŭ ortografie interveni en liaj tekstoj, redonante al ili la eliziitajn elizisignojn, t.e. apostrofojn.

ALAIN
FOURNIER:

La granda Meaulnes

(Eltiraĵo el la romano de Alain Fournier,
nun finpresita kaj baldaŭ aperonta en eldono
de STAFETO)

SED mi petis lin, nenion tian fari, nur atendi. Kaj mi mem ne rapidis averti Meaulnes (*). Tiom da adiciig-antaj bonŝancoj iomete zorgigis min. Kaj tiu mal-trankvilo ordonis al mi, nenion anonci al Meaulnes, antaŭ ol mi almenaŭ vidis la junulinon.

Ne longan tempon mi atendis. La morgaŭan tagon, iom antaŭ la vespermango, jam eknoktigis, mal-varmeta nebuleto, pli septembra ol aŭgusta, sterniĝis kun la nokto. Firmin kaj mi, supozante malplena la butikon por iom da tempo, iris al Marie-Louise kaj Charlotte. Mi konfidis al ili la sekreton, kiu kondukis min al Vieux-Nançay je tiu iom frua tempo. Kubute sur la vartablo aŭ sidante kun ambaŭ manoj sur la vaksita ligno, ni reciproke rakontadis, kion ni sciis pri la mistera junulino — kaj tio resumiĝis je vere malmulte — kiam bruo de radoj igis nin turni la kapon. — Jen ŝi, estas ŝi, ili mallaŭte diris.

Kelkajn sekundojn poste, antaŭ la vitropordo, haltis la stranga jungaĵo. Malnova farmveturilo, kun rondaj paneloj kaj etaj modluritaj galerietoj, kiajn ni neniam vidis en tiu ĉi regiono; maljuna blanka ĉevalo, kiu ĉiam ŝajnis mordeti ian herbon de la vojo, tiel multe li mallevis la kapon; kaj sur la sidilo — mi tion diras en korsimpleco, sed jam sciante, kion mi diras — la plej bela junulino, kiu iam estis en la mondo.

Neniam mi vidis tiom da gracio kuniĝi al tiom da gravmieneco. Ŝia vesto faris ŝian talion tiel maldika, ke ĝi ŝajnis rompebla. Granda kaŝtankolora mantelo, kiun ŝi enirante demetis, kovris ŝin ekde la ŝultroj. Ŝi estis la plej gravaspekta el ĉiuj junulinoj, la plej gracia el ĉiuj virinoj. Peza blonda hararo falis sur ŝian frun-ton kaj ŝian vizaĝon, delikate desegnitajn, fajne modlitajn. Sur ŝian tre puran vizaĝkoloron la somero metis du lentugetojn . . . Mi rimarkis nur unu difekton en tiom da beleco; je la momentoj de malgajo, de

senkuraĝiĝo, aŭ simple de profunda pripenso, tiu vizaĝo tiel pura iomete vejniĝis per ruĝo, kiel okazas ĉe iaj malsanuloj grave sed sensuspekte tuŝitaj. Tiam la tuta admiro de tiu, kiu rigardis ŝin, cedis al ia kompato tiel pli korŝira, ke ĝi pli abrupte surprizis. Jen almenaŭ tio, kion mi malkovris, dum ŝi malrapide malsupreniris el la veturilo, kaj kiam Marie-Louise facilgeste prezentante min al la junulino instigis min paroli kun ŝi.

Oni donis al ŝi vaksfrotitan seĝon, kaj ŝi sidiĝis, apogite al la vartablo, dum ni restis starantaj. Ŝi ŝajnis bone koni kaj ŝati la butikon. Mia onklino Julie, tuj aver-tita, alvenis, kaj la tempo, dum kiu ŝi parolis, regule, kun manoj krucitaj sur la ventro, mole balancante sian kapon de komercistino-kamparanino ĉapelitan de blanka kufo, malfruigis la momenton — kiu iomete tremetigis min — kiam la konversacio komenciĝos kun mi . . .

El la franca
trad. Roger Bernard

TRISTAN
CORBIÈRE
(1845-1875):

La bufo

Jen kanto en la nokt' trankvila . . .
— La lun' desegnas, metalbrila,
Malhelan verdon de l' konturo.
— Jes, kanto; kvazaŭ eĥo-febro
Kaŝita tie, sub la vepro . . .
— Silent': jen tie, en obskuro . . .
— Ho, bufo! — Kial timo tia
Apud mi, via brak' fidela?
Jen ĝi, poet' sen har', barela,
La najtingal' de l' koto . . . — Fia!
— Ĝi kantas. — Fi!! — Ho kial fi?
Rigardu ĝian lum-okulon . . .
Ĝi fuĝas, fride, sub terbulon.
.. ..
'nokton . . . ĉi bufo estas mi.

El la franca
trad. Roger Bernard

(*) elparolu: Mōn, kun longa fermita o.

Tradukita poezio

Tria premio

Ĥoro de bakĥantinoj

de Eŭripido

Eŭripido estas la tria el la grandaj dramverkistoj de Ateno. Li verkis "La Bakĥantinojn" ĉirkaŭ 400 a.K., kiam li estis pli ol 70-jara. Oni konsideras ĝin lia ĉefverko. Ĝi estas tragedio pri homoj regataj de psikaj potencoj, kiujn ili ne komprenas. La ĥoro estas kantata de bakĥantinoj malliberigitaj de la reĝo Penteo, kiu volas subpremi ilian kulton.

STROFO Ĉu denove en danco nokta
pale lumos piedoj blankaj?
Kiam en la aero rosa
mi skuos kapon en ravo bakĥa?
Ho, la ĝojo de la ĉervido
kiu petolas sur herbejo,
eskapinte de la ĉasisto
kaj la teruro de la reto.
For de la laŭta ĉaskriado
kaj de la postkurantaj hundoj,
fuĝe laŭ riverborda sablo
ĝi kaŝas sin en arbarprofundo,
en la lokoj kie la homo
neniam lasis sian spuron,
sub la protekto de la ombro
kie folioj forigas lumon.
Kio estas saĝo, kaj kio
povus superi dian donon
ke super kapo de malamiko
triumfan manon streĉu homo?
Honoro estas al ĉiuj kara.

ANTISTROFO Malrapide sed certe ĉiam
alproksimiĝas di-potenco,
punas mortemulon obstinan
kiu sekvas sian frenezon
kaj al dioj rifuzas honoron.

Dum piedoj de tempo paŝas
ili subtile kaŝas sonon
sed malpiulon fine kaptas.
Pensi, agi kontraŭ la leĝoj
al mortemulo ne konvenas.
Eta peno akcepti kredon;
povo al dioj apartenas.
Moro kiu daŭris tra tempo
staras en forto kaj sekuro.
Kio ekzistis tra jarcentoj
trovas bazon en la naturo.
Kio estas saĝo, kaj kio
povus superi dian donon
ke super kapo de malamiko
triumfan manon streĉu homo?
Honoro estas al ĉiuj kara.

EPODO

Feliĉa kiu havenon
trovas, maron eskapas.
Iel iu homo havas
riĉon pli ol aliaj.
Loĝas mil esperoj variaj
en miloj da homaj koroj;
pereu venos aŭ gloro.
Tiun homon mi feliĉa nomas
kiu ĉiutage ĝojon trovas.

El la antikva greka tradukis Albert Goodheir


Unua premio

La blinda knabo

de Colley Cibber (1671-1757)

Ho, kio estas Lumo, ke mi
Ne estu ĝin ĝuinta?
Kiel la vido povas beni?
Diru al knabo blinda!
Belaĵojn havas vi el ĝi;
Laŭ vi, sunlumo klaras;
Mi sentas varmon: kiel ĝi
Tagon aŭ nokton faras?
Tagon aŭ nokton scias formi
Mi mem per dorm' aŭ ludo;
Se ĉiam povus mi maldormi,
Tag' estus sen konkludo.
Mi ofte aŭdas vin priĝemi
Mian malforton fatan;
Sed bone povas mi elteni
Perdon ja nekonatan.
Do mian ĝojon tiu manko
Ne prenu for en rabo:
Dum mi kantivas, reĝe vivas
Mi, kvankam blinda knabo.

El la angla: William Auld



**BELARTAJ
KONKURSOJ
1975:**

Originala poezio



Dua premio (en egaleco)

Postsomeraj strofoj

Septembra parko. —
Ankoraŭ verdas fago.
Jam kaŝtanoarbo
ekflavas; perlas sange
aŭkupro, kratago.

Nokte sub pinoj. —
Okulumas planedo
inter la pingloj,
sur ondoj de la nigra
nokthararo juvelo.

Ruĝas Oktobro
ĉiujare pli glorie.
En kverkokronoj
la subbrulinta sento
ekplodas vivhonore.

En pluvnebuloj
malaperas deklivoj.
Kelkaj insuloj
videblas super maro:
la foraj montopintoj.

Surpintan neĝon
transmonta sun' altrudas
sed nur momenton,

dum super orfolioj
la aŭtuntago nubas.

Pluvpeze staras
postsezona tritiko.
Neniu faras
rikolton; ĝi forputros
kiel monta filiko.

Sur la hejmkampoj
kie mi iam plugis
abundas kardoj,
sed revenos hirundoj
kiuj suden forflugis.

Arboj en vico. —
Ondadas la linio
de pint' al pinto,
sub nuboj malstabilaj
en fluo estas ĉio.

Falis folioj. —
En urbego tra branĉoj
brilas lumiloj,
signaloj de senvoĉaj
koroj en multaj ĉambroj.

Serĉas fluetoj
serpentume tercentron
sur lumbeno:
sub falintaj pluveroj
aŭtobusa fenestro.

Kriad' ansera
sub vespera ĉielo
fenikoptera. —
Harmonias urbego
dum momenta korhelo.

Albert Goodheir (Skotlando)

Uraganoj

Multaj uraganoj
skurĝe
kirlmuĝis
tra ĉi vivo,
kiu sin rulas jam
sur mortdeklivo.
Nulas,
post ĉiu tempesto,
en tuja kaj fora
perspektivo
l' iriza kresto
de l' deziro.
Vanis
kaj vanas
anhela kur' kaj iro
por celatingo
de l' feliĉo.
La solo nur
per sia frida ringo
min stringas ĉiam
en torda
cerbovringo.

Vanis elanoj
de l' junaĝaj jaroj.
Amo kaj amor',
sekso, feliĉo,
sovaĝaj sentoj
de l' iamo
cedis la sceptron
al la desaponto
de solul',
kies vivoflamon
nun nutras
sole angorsento
kaj la delico
de la mortotento.

Nicolino Rossi (Italio)

**BELARTAJ
KONKURSOJ
1975:**

Premio Harabaĝiu por

**Nova
Talento**



Jonas Negalha: El la poemserio titolita

La tago plej kurta

I — La tago plej kurta

Ĝi estos la tago plej kurta
ĝi ne havos dudek kvar
ĝi eble daŭros [horojn,
apenaŭ kelkminute.

Estos terura
ĉielarko, [antaj
multaj koloroj eksplod-
en fungoformajn nubojn,
fajrego,
ventego
kaj fine
fridaj cindroj,
Poste
Estos neniu tago
Estos neniu nokto
Estos neniu tempo . . .

plu kuras
sub densa nebulo.
Ankoraŭ vivantaj ombroj
Sangopenegas
por rampi
por travivi
por spiri
per asfiksiaĵo
kiu ilin sufokas
terure
lante.

Kienas ili?
Kiu scias? [akvojn
Ili mergiĝas en la mar-
sen marvegetaĵoj
sur la ondoj de fumo
kun mortaj fiŝoj.

La maro
enhavas ne tiom da cindro,
la lastaj vivantaj estaĵoj
povas ankoraŭ travivi
en la malpurigitaj akvoj.
Vivo rezistas,
rifuzas la finon
kiun homo donis al ĝi.
Vivo revenas maren.

XVIII — Reveno al Maro

Sur la kontinentoj kovritaj
de cindro,
neniu timema folio
de herbo,
nek restaĵo de klorofilo.
Kotozaj riveroj

XXI — La epitafo kiu ne estos skribita

Iu venanta
de aliaj mondoj
kaj pasanta ĉi tie —
pensos iomtempe kaj ekvidos
ke mi suferis, amis kaj mortis.
Vojaĝanto, haltu unu momenton.
Ni estas senviva planedo
aŭ ringo da asteroidoj
inter ardeca Venuso
kaj frosta Marso.
Vi scias
kial ni mortis.
Vi havas nenian
oston por esplori,
nek alarmon de Bertrand Russell,
nek poemon de Victor Hugo,
nek pentraĵon de Mikelanĝelo,
nek muzikon de Beethoven
sur la petrigitaj cindroj en spaco.
Rigardu, frato, nian mizeron,
konsilu aliujn —
iru, ĉar mi ne povas —
por ke ili
ne detruu siajn mondojn
kiel ni faris al la nia.

El la angla tradukis
Miroslaw Wiechowski

Tri poemoj

Mi ne foriros post la noktomezo,
mi ĝisatendos la matenkrepuskon,
kun miaj okuloj apertaj kaj timplenaj,
kun mia koro batanta kiel preĝeĵaj tursonoriloj,
kun la korpo tremanta trapikite per sagoj de timo,
kun fobio kaptanta per mortopremo.

Mi ne foriros antaŭ la tria kokokrio
antaŭ la subiro de l' luno, antaŭ la bleko de fringelo.
Mi ne foriros, ĉar mi estus sola sur la disvojiĝo
dum per doloro maturiĝas la lasta sunsubiro.

* * *

En dormanta silento
Interrompata per pigra bojado de hundoj
Lante ŝvelas la grizo.

Mallertaj dormemaj briletoj
Pasante
Lekas la branĉojn de arboj.

Senkuraĝaj kaj fragilaj ombroj
Tralumas la foliaron,
Pigre gutas teren.

Baldaŭ elmergiĝos la varma sunglobo
Sendante faskojn da hela lumo
Al la Tero spiranta malfacile
Post la ĉijara akuŝo.

* * *

Aŭ
Vi leviĝos
Kaj antaŭenos
Aŭ

Viaj piedoj eligos radikojn
Kaj vi restos por ĉiam
Plena de sopiro
Kiel sablero
En klepsidro . . .

Originale verkis Miroslaw Wiechowski (Pollando)

EMILIJA
LAPENNA:

Troigo

RADIO-LUDO

(Malica verkoforma venĝo, fare de senpovulo,
kontraŭ multelspeza socio)

Viraj voĉoj: BASO
TENORO

Virinaj voĉoj: KRIĈA
MIAŬECE DORLOTA

Voĉoj parolas per telefono.

(Telefon-sonorado)

BASO: Halo, Ivo, ĉu mi vekis vin?

TENORO: Ne, mi tajpas. Mi ne finis ankoraŭ artikolon por la morgaŭa tria ĵurnaleldono.

BASO: Bone; mi supozis, ke tiel estos kaj mi direktas al vi peton. Ĉu vi kapablos reagi rapide kaj tre trafe?

TENORO: Unue diru la peton, ke mi sciu pri kio temas.

BASO: Jen: Mi verkas ion kaj bezonas tre trafan eĉ brutalan ekzemplon por kio elspezas sian monon tiel nomata multelspeza socio en industrie alte evoluintaj landoj.

TENORO: Nu, tiaj ekzemploj kuŝas ĉie je manatingo...

BASO: Sed mi bezonas ion drastan. Ion ekzakte kontrastan al mia priskribo de malsatado en multaj landoj, de militsuferoj, detruitaj urboj kaj vilaĝoj, de kampoj transformitaj en herbaĉdezerton nur pro tio, ke la industrio de armiloj estas ankoraŭ ĉiam la plej profito-dona.

TENORO: Bone, bone, mi komprenas. Ĉu vi povos morgaŭ posttagmeze veni al mi. . . ?

BASO: Tute ne. Mi bezonas tion tuj. Mi volas fini hodiaŭ tiun parton de la verko, kie mi uzos tiun ekzemplon.

TENORO: Kion do fari?

BASO: Stranga homo vi estas; do, se vi havas ideon, diru ĝin tuj.

TENORO: Ideon mi ne havas, sed jes magnetofonan registraĵon tre konvenan por vi.

BASO: Mi petas, ne ŝercu. Estas preskaŭ noktomezo, ni ambaŭ lacas kaj tamen laboras, kaj vi trovas tian momenton taŭga por ŝerco. Nekredeble!

TENORO: Nu, ĉesu! Mi ne ŝercas. Mi vere posedas registraĵon el unu luksa vilao, kie loĝas luksaj homoj kun siaj luksaj kutimoj.

BASO: Sufiĉe, sufiĉe, ne malicu! Kiel vi povus ricevi registraĵon el unu tia medio?

TENORO: Estas mia sekreto, sed mi posedas ĝin kaj ĝi estas aŭtentika. Krome, se vi jam ambicias esti verkisto, vi ja devus scii, ke ĉiuj luksaj homoj estas ĉirkaŭitaj de malluksaj enviuloj, kiuj malamas ilin, — afero neevitebla.

BASO: Mi petas, pro kio neevitebla?

TENORO: Ĉar luksa homo ne povas vivi sola en unuĉambra loĝejo, kiel mi kaj vi, ne povas manĝi en memserva restoracio kaj ne povas viŝi polvon mem desur sia meblaro, kion ankaŭ ni du faras.

BASO: Ho, mi petas, ĉesu per cinikismo, enmordu la kernon.

TENORO: La kerno estas, ke luksaj homoj ĉion faras per alies manoj, ne per la propraj, ĉar ĝuste tio faras ilin luksaj. Kaj tiuj manoj, kiuj laboras por ili, aŭ kapoj, kiuj pensas por ili, preskaŭ senescepte malamas ilin. Malamo estas tre bona subaĉetilo.

BASO: Kaj vi eluzis tiun subaĉetilon?


TENORO: Jes, iomete mi lubrikis ĝin per oro, kompreneble oro en biblia senco, ne en la konkreta. Realaj estis monbiletoj — eĉ ne tro multaj.

BASO: Tio sonas iom fantaste, ĉu vere vi tion faris?

TENORO: Ŝajnas, ke vi estas granda naivulo, nescianta pri la eblecoj, kiujn ofertas al ni nia kara evoluinta socio.

BASO: Ne estu malica. Nu, funkciigu magnetofonon, mi volas aŭdi, jam vere estas tre malfrue.

TENORO: Bone, bone, jen! (Aŭdiĝas karakteriza kraketado de magnetofona bendo antaŭ eksono de la voĉo)



KRIĈA: Halo, halo, ĉu estas vi Anjo?

DORLOTA: Jes, jes, estas mi, mi ne sidas sur telefono, vi ja scias tion, oni devis alporti ĝin al mi, mi gimnastikas.

KRIĈA: Gimnastikas nun, kaj kion vi faris matene?

DORLOTA: Mi dormis. Feĉjo venigis gastojn, siajn ĉasistojn, kiuj restis ĉi tie ĝis la kvara matene . . .

BASO (*ensaltas*): Ivo, vi tamen umas min. Sur tiu via bendo estas ambaŭ voĉoj de la telefonantaj virinoj. Tio ne eblas. Via homo povis surbendigi nur tiun parolantan en la ĉambro.

TENORO: Mi simple ne havas vorton por via nescio. Kompreneble, la teknika subaŭskultilo estis en la aparato kaj kaptis ambaŭ voĉojn. Ĉu vi neniam vidis tiujn nuntempajn spionojn, sen korpo?

BASO: Ne, ne, neniam. Nu, aŭdigu la registraĵon.

DORLOTA (*ripetado*): . . . ĝis la kvara matene.

KRIĈA: Anjo, mi bezonas vin. Ĉu inter viaj gastoj estis tiu profesoro veterinaro, ĉefo de iu katedro tie?

DORLOTA: Profesoro Paso, ĉu lin vi bezonas?

KRIĈA: Jes, se li estas tiu katedro-ĉefo. Pripensu, mia Fufi hieraŭ almenaŭ dekfoje oscedis. Mi estas en granda zorgo, kio okazis al mia Fufi, kial ĝi oscedas, devas esti ia kaŭzo, mi timas, ke tio malutilos al la brilo de ŝia krispa peltito, ho, mi volas . . .

DORLOTA: Jes, mi scias, kion vi volas. Ke profesoro Paso priesploru vian pudelinon. Jen, nun vi havas, mi bele konsilis al vi ne aĉeti pudelinon, ĉar tiu specio estas tre sentema, sed vi neniun volas aŭskulti.

KRIĈA: Sufiĉe, sufiĉe, mia Fufi havas pedigreeon*, kian via Cezaro tute ne havas.

DORLOTA: Mi petas, ne mensogu. Cezaro estas tute alia hundo ol via Fufi. Kiel Cezaro ekzistas tre malmultaj hundoj, kaj ian pudelinon oni ja povas trovi . . .

KRIĈA: Sed Anjo kara, ĉu ni malpaciĝos pro hundoj, kvazaŭ iaj etburginoj? Mi petas, aŭskultu min . . .

BASO (*ensaltas*): Ne, ne, ne, ne povas ekzisti tiel stultaj virinoj disputantaj pri hundoj kaj ne opiniantaj sin etburginoj. Kio do ili volas esti?

TENORO: Kiam stultulo konsciiĝas pri sia stulto, li ne plu estas stultulo. Almenaŭ tio estas klara, ĉu?

BASO: Por vi ĉio klaras, beata homo! Funkciigu ĝin, por ke mi aŭdu la daŭrigon.

KRIĈA (*ripeto de la lastaj vortoj*): . . . aŭskultu min. Donu al mi la adreson de tiu profesoro Paso, tuj mi iros al li kun Fufi, tuj.

DORLOTA: Hieraŭ li ne estis ĉi tie; krome, lian adreson mi ne scias. Sed ĝuste hieraŭ mi parolis kun doktoro Medo, li estas ankaŭ profesoro ĉe la veterinara fakultato.

KRIĈA (*ensaltas*): Sed li ne estas ĉefo de katedro! Ĉu mi lasu simplan profesoron priesplori mian Fufi? Ne. Paso estas eminenta en sia fako, li ja estas ĉefo de la katedro.

DORLOTA: Kaj vi estas sub obsedo de tiu katedro. Ankaŭ Medo estas tre bona, kaj li certe tre bone scios konsili vin, kion fari pri via Fufi.


KRIĈA: Kiom vi durkapa estas! Ĉiam vi volas pravi. Ĉu vi memoras, kiam vi konsilis min aĉeti por mia

Fufi tiun kamelharan kovrilon, vi certigis min, ke ĝi estas supera-kvalita.

DORLOTA: Nu, kaj ĉu ne estas?

KRIĈA (*kolere*): Kompreneble ne. Mi volis por Fufi kovrilon el haroj de hinda kamelo, kaj tiu, kiun mi aĉetis laŭ via konsilo, estas de iu mizera alĝeria. Fufi tiel esprime rigardas min; ĝi kvazaŭ diras, ke tiu malfajna kovrilo ĝenas ĝin.

DORLOTA: O, ho, ho, nun vi eĉ diros, ke via Fufi scias paroli.



KRIĈA: Ĉiuokaze Fufi per okuloj scias diri multon pli saĝe, ol certaj per vortoj.

DORLOTA: Ĉu tio rilatas min?

KRIĈA: Hja, kia vi estas, tuj vi ofendiĝas. Finfine, pensu, kion vi volas, sed havigu al mi tre, tre rapide la adreson de profesoro Paso.

DORLOTA: Ĉu, eĉ tre rapide, nu bone, mi faros . . . (*Kraketado, fino de la sonbendo*).

TENORO: Ĉi tie rompiĝis la bendo, ĉu sufiĉe, aŭ vi volas ankoraŭ ion aŭdi?

BASO: Mi aŭdis vere sufiĉe. Sed, Ivo kara, ĉu vi ne volas konfesi, ke tiu via registraĵo estas aranĝo, ne la vero? La vero ne povas esti tia. Riproĉi, ke kamelhara kovrilo ne estas sufiĉe bona por hundo, en la mondo, kie miloj da infanoj en malvarmaj noktoj tremas kovritaj per seka palmobranĉo, se eĉ tia ekzistas. Ne, via registraĵo estas teatraĵo.

TENORO: Karulo, ĉu vi memoras, kiel antaŭ multaj jaroj tiuj homoj ĉi tie ne volis kredi al via patro pri la vero reginta en Dachau kaj Auschwitz? Ankaŭ ili diris: Ne, tiaj cirkonstancoj ne povis reale ekzisti, tion elpensis la diabla fantazio de ruĝuloj. Vi bone scias, ke via patro parolis la veron. Ankaŭ mia sonbendo registris la veran interparolon.

BASO: Ne miksu politikon en tiun nian konversacion!

TENORO: Ĉio estas politiko, olda mia, ankaŭ via verkado. Ankaŭ tio, ke ni per ĉiuj fortoj fermas la okulojn por ne vidi la veron en ĝia reala aspekto.

BASO: Sufiĉe, sufiĉe, ne filozofiu. Nun jam pasis noktomezo, ni iru dormi, bonan nokton!

TENORO: Ĉu nur bonan nokton? Danki vi ne volas pro la aŭdita registraĵo? Jes, mi bone scias, malofte oni dankas pro la aŭdita vero. Bonan nokton! (*Frapo de la telefona aŭskultilo*)

* Pedigreo — genealogio de besto.

Akcidento

LA ŜOFORO ja tute ne reagis! Li simple ignoras miajn lumadmonojn! Li ne mallongigas la lumojn, impertinentulo! Mi nenion vidas! Fiksi la rigardon denstren, al la rando de la ŝoseo — kio ĝi estas, diable! ? Ĉu mi troe alrandiĝis? Sed la frakaso. Mi espereble ne superveturis ian bicikliston. Ho, teruro! Malbenita ŝoforo!

Sed ne, mi ne haltos por certiĝi. Mi simple frapis kontraŭ la ĉeranda stangeto. Tamen la kolonetoj ja estas ŝtonaj kaj ĉe la frapo klare sentiĝis metalo . . . Ne, ne, mi ne superveturis iun ajn! Bicikliston mi ja estus rimarkinta, la ruĝa reflekteto ja vidiĝas bone. Mi nur trankvile veturu pluen.

Mi devas halti kaj certiĝi pri la afero. Tiel, tute dekstren kaj funkciadu ĉiuj lampoj por ke ne okazu ankoraŭ io. La triangulon mi starigos tie, mi esperas, ke li estas viva.

Kia mallumo! Mi forgesis la baterian lampon.

Jen ĝemo. Estas li.

Ĉu vi estas vundita, ĉu multe doloras? Ĉu vi povas moviĝi? Estis la ŝoforo de la kamiono, li ne volis mal-suprenigi la lumojn, mi estis tute blindigita.

Vi ja sangas! Ĉu vi povos iri ĝis la aŭtomobilo? Mi veturigos vin al kuracisto. Proksimas urbeto. Ĉu mi portu vin? Ĉu vi sukcesos? Apogu vin, jen . . .

Veturi kun longaj lumoj renkonten, malgraŭ la admonoj! Terure! Kaj certe, nun mi kulpos, la kamiono ja malaperis.

La homo verŝajne mortis, mi ja sentis, ke la biciklo tute frakasiĝis. Kulpa pri mortigo, mi, kiu neniam ĝis nun . . .

Sed neniuj ja vidis ke estis mi. Mi rapide pluveturu kaj malaperu. Oni trovos lin kaj helpos, se necese.

Jen urbeto. Eble li ĉi tie vivis. Eble lin atendas familio. Eble li estas juna kaj nun zorgas pri li la patrino, lia juna edzino. Eble ŝi estas graveda kaj, se ŝi post la akcidento sukcesos finporti la infanon, naski ĝin, ĝi estos sen patro. Kaj mi kulpos pri ĝi, mi eĉ ne provis savi ĝian patron, helpi lin! Eble li kuŝas ie sur la ŝoseo kaj iu alia aŭtomobilo superveturos lin, ankoraŭ vivan . . .

Terure! Jes, estas malpermesite turni ĉi tie, tamen la afero urĝas, la afero urĝas!

Jen milicano! Fajfego, sed mi ne haltos. Mi devas rapidegi! Li ne povas postveturi min, tamen li vidis mian numeron, li notos ĝin, oni punos min, eĉ se mi al ili klarigos la aferon, mi ja forveturis anstataŭ helpi, mi — ne gravas, la homo eble estas mortanta sen helpo, eble li bezonas kormasaĝon, eble mia spiro savus lin.

Nur li ne estu morta kiam mi atingos la lokon!

Li malaperis kaj li plue amuziĝos per blindigado de ŝoforoj. Kaj la kulpulo estos mi! Nur rapide, rapide for!

Nenion mi volas scii pri la afero. Ne, ne, nur kiom eble pli malproksimen antaŭ la mateno!

Jen urbeto. Tute proksima ĝi estas. Oni trovos lin, baldaŭ ja tagiĝos.

Nur plue, plue, neniuj vidu min eĉ proksime de la loko! Ie mi devos halti, esplori la karoserion. La kunpuŝo ja estis forta kaj certe videblas signoj sur ĝi. Eble ĝi eĉ estas sangomakulita. Terure se iu vidus la sangon sur mia aŭtomobilo! Kie mi haltu?

Nenio farebla ĝis tagiĝo! Mi eble ion ne rimarkus kaj poste, post tagiĝo, iu alia povus ion vidi pli frue ol mi . . . Ne, ne, mi kaŝu min ie, mi ne moviĝu ĝis la mateno kaj poste la aferon mi facile ordigos!

Sed — se mi devos forlavi la sangon, ne sufiĉos la malmulto da akvo, kiun mi kunhavas. Necesus multe da akvo! Malbenita afero! De kiu peti ĝin? Oni ja tuj scius . . .

Mi nur pluveturu, ankoraŭ, ankoraŭ, eble mi ie trovos taŭgan lokon. Ĉiukaze mi nepre ĝustatempe ordigu la aŭtomobilon. Kion signifas ĝustatempe? La fremdaj okuloj ja ĉiam sekvas ĉiun onian paŝon!

Certe, mi devas lavi la tutan aŭtomobilon, ne nur la dekstran antaŭan parton. Tamen mi post tioma



**GASTON
WARINGHIEN:**

EL LA ANTAŬPAROLO AL

La trofeoj

La sonetaro "La trofeoj" de la franclingva poeto José-Maria de Heredia (1842-1905) post nelonge aperos libroforme en la Internacia Lingvo ĉe la eldonejo STAFETO de J. Régulo. La kompletan verkon tradukis Gaston Waringhien. Por vekti la apetiton ni ĉi tie prezentas parton de la antaŭparolo de prof. Waringhien kaj – salute al la venonta kongreso en Ateno – soneton el la sekcio "Grekujo kaj Sicilio".

TIO EBLE ŜAJNOS sensprita paradokso, ke en la tempo mem, kiam eminentaj poetoj liberigis sin je la katenoj de la ritma reguleco kaj de la senca klareco, mi elektis por tradukado ĝuste la ĉefverkon de la franca parnasismo, nun tiom eksmodiĝinta. Mi ja ne kaŝas al mi, ke *La Trofeoj* ne estas unu el tiuj epok-faraj poemaroj, kiel estis la "Canzoniere" de Petrarko, la "Amours" de Ronsardo, la "Sonnets" de Ŝekspiro aŭ la "Fleurs du Mal" de Bodlero.

Tamen kun tiuj grandaj antaŭuloj Heredia havis ion komunan, t.e. la senton, ke ju pli mallonga estas poemo, des pli forta estas ĝia poezia ŝargo. Same kiel Mallarmé, lia ĝusta samtempulo, li strebis fermi en la plej konciza kaj strikta formo plej vastan mondri-gardon: ĉe Mallarmé ĝi estis filozofia, ĉe Heredia ĝi estas historia. Kompreneble tio kuntrenas post si grandajn esprimstreĉojn, kaj nek unu nek la alia estas facilaj poetoj. Sed la plej sukcesaj sonetoj el *La Trofeoj*

veturado neniel povas veni hejmen en pura aŭtomob-ilo!

Se milicpatrolo haltigos min por kontroli la funkci-adon de la lampoj, de la bremsilo, mi devos halti. Ili nepre rimarkos, mi eĉ ne sukcesos ŝajnigi trankvilon. Ili tuj vidos ĉiun ŝanĝon sur la aŭtomobilo. Eĉ se ne, tamen ili rememoros min kiam ili ekscios pri la akcidento. Kiel fari! ?

Mi estas perdita, oni kaptos min, oni akuzos min, oni punos min, mi ja devis resti je la loko, helpi laŭeble, anonci min. Nun nenio plu eblas, oni certe jam trovis la kadavron, oni postkuras min eble eĉ kun hundoj, oni trovos min, kien mi . . .

FINO


revekas el la pasintaĵo vivantan scenon, kie resumigas la tuta civilizo de unu epoko. Kiam li pentris la junan Ĉelini okupata cizeli

La sturmon de l' Titanoj sur pomo de ponardo li majstre ekzempligis la ambicion de sia arto.

Cetere al mia elekto estas ankaŭ aliaj motivoj. Heredia havis tiun kapablon de la veraj poetoj, ke, pro la feliĉa aranĝo de la sonoroj (ĉu li ne pretende asertis, ke en bona verso devas soni almenaŭ r?) kaj la eltrovo de la elvokanta bildo, multaj el liaj versoj, ekde la unua lego, gravuriĝas en la spirito. Dum la longaj enuadoj de mia kaptiteco, fariĝis en nia rondo unu distro, provi rekonstrui, el la kelkaj versoj restintaj en ies memoro, tiun aŭ alian soneton. Povu do leganto resenti, trae de mia traduko, iom el tiu pompo de la vortoj kaj lukso de la parolo!

J. M. HEREDIA:

La forgeso



La templo ruiniĝis de l' promontor',
Kaj mortfrapite kuŝas sur kruda ĉi tereno
Diinoj kaj Herooj, marmor' kaj bronz' – forpreno
De l' herb' dezerta, kie kaŝiĝas ties glor'.

Sola, bovist', fojfoje pelanta gregon por
La trink' vespera, konkon per antikva refreno
Sonigas tra l' marspaco kaj la ĉielsereno,
Nigra kontur' tranĉita sur la lazuro for.

Por la malnovaj Dioj la Tero patrinsenta
Kun vana elokvento je ĉiu Maj' alskulptas
Rompitan kapitelon per nova dornakanto.

Sed al prapatraj revoj la Hom' indiferenta,
En la kvietaj noktoj, sen ia trem' aŭskultas
Maron lamente plori pri la Sirena kanto.

1876

Trad. G. Waringhien

Sirenoj (seirên) personigoj de la allogoj kaj danĝeroj de la maro, loĝis ĉe la enirejo de la Sicilia markolo, kie per sia sorĉkanto ili dronigis la ŝipanojn.

Por proza renesanco

Jam en la marta numero de *Esperanto* 1975 (sur la paĝo 46) ni aperigis provizoran anoncon pri eble senprecedenca nova premio – la premio "Raymond Schwartz". Premio de 4 300 (kvar mil tricent!) guldenoj ne estas ĉiutagaĵo, kaj la fakto, ke la regularo permesas al la konkursantoj preskaŭ kvar jarojn por la verkado, montras, ke oni atendas de ili iom da serioza laboro. La premio Schwartz estos aljuĝita en la jaro 1980, al la plej bona "ankoraŭ ne eldonita proza fikciaĵo en Esperanto". Laŭ la regularo, preparita en la komisiono pri la Belartaj Konkursoj de UEA, la esprimo "proza fikciaĵo" inkluzivas

romanojn kaj koherajn novelarojn. La plena regularo estas ricevebla ĉe la sekretario de la Belartaj Konkursoj: s-ro Alec Venture, 55 Park Hill, Carshalton, Surrey, SM5 3SE, Britujo.

Ĉiu konkursa verko devas ampleksi almenaŭ 40 000 vortojn, (Por komparo, unu plenstopita numero de ĉi tiu revuo, se ĝi ne enhavus bildojn, ampleksus ĉ. 20 000 vortojn.)

La limdato por livero de la manuskriptoj (tajpitaj, en 4 ekzempleroj) estas la 30-a de septembro 1979.

La rajto pri la unua presigo de premiita verko apartenos al UEA.

Estas klare, ke la anoniman donacinton de la premia mono motivis la

malfeliĉa fakto, ke iom longaj prozaj verkoj originale verkitaj en Esperanto estas tre malabundaj: en *Monda Kulturo*, en 1963, William Auld statistikis 37 romanojn, el kiuj la plimulto aperis antaŭ 1935. La nova konkurso "Schwartz" estu sprono al renesanco de la Esperanta proza belliteraturo. Ek al verkado!

Premio Minnaja por plej bona eseo

Kaptinte la atenton de la prozistoj, ni memorigu samtempe ankaŭ pri alia prozpremio: la premio "Luigi Minnaja". Ekde 1976 estos aljuĝita aparta premio en la kadro de la proza branĉo de la Belartaj Konkursoj, por la plej bona eseo lingva, literatura, historia aŭ sociologia, prefere en ligo kun Esperanto kaj ĝia uzado. Minimuma amplekso 10 tajpitaj paĝoj. Ceteraj reguloj estas la samaj, kiel por la aliaj branĉoj.

Indekso 1975

68a jarkolekto

Afriko 106
Alencar, J. de 170
Amouroux, J. 103
Andersen, H.C. 66, 155
Angel, M. 2
Angelova, M. 98, 156
Angla lingvo 87
Antaŭ 50 jaroj 33, 91
Antologioj 26
Antoni, A. 130
Apcher, L. 179
Araba lingvo 47
Argentino 96
Aristofano 202
Armand, D.L. 98, 175
Astronomio 16
Atanasov, A.D. 152
Aude, A. 190
Auld, W. 26, 46, 98, 204, 211
Aŭstralio 37, 118
Aŭstrio 76, 117, 136
Avsec, O. 179
Ayres, C.N. 59
Azcuénaga, J. 94
Azio 108, 127

Bakker, H. (patro) 135
Balbin, J. 26, 57
Balech, E. 90, 192
Bánky, R. 154
Barcsay, Z. 28
Bárczi, G. 197
Bárochová, A. 100
Bartelmes, N. 70
Béguin, D. 17, 155, 156
Behrmann, H. 28, 77
Belgio 6, 37, 48, 56, 76, 77, 86, 97, 136
Benczik, V. 30, 113, 201
Berman, O. 176
Bernard, R. 46, 210
Berthelot, P. 103
Biblioteko Hodler 5
Bibliotekoj 5, 98
Blanke, D. 32, 133
Blokke, H.J. 40
Bormann, W. 163
Brandenburg, U. 194
Brazilo 16, 97, 136
Breddels, A. 108
Britio 96

Brozović, D. 85
Bruno, G. 179
Bugge-Paulsen, R. 38, 152
Bulgara Esperanto-Teatro 154
Bulgario 77
Bulonja deklaro 165
Bunea-Bunesku, I. 76
Burundio 77
Carlevaro, T. 29, 31
Caspary, P. de 88
CED 29-32, 62, 107
Chirac, J. 65
Cibber, C. 211
Conterno, C. 46
Corbière, T. 210
Corsetti, R. 88
Csapo, J. 59
Cseh, A. 175
Ĉeĥoslovakio 58, 74, 96, 174, 196
Ĉilio 174
Ĉina lingvo 197
Ĉinio 7, 37, 127, 197
Dahl, E. 153
Damjanov, V. 156
Danlando 24, 56, 97, 171
Dean, E.F. 6
De Kock, E. 118, 208
Delcourt, M. 103
Delegita reto 17, 64, 190
De Smet 197
Diplomatiko 38, 137, 144, 196
Diskoj: vidu Eldonaĵoj
Dresen, H. 153
Dresselhaus, H. 40
Duc Goninaz, M. 85, 154
Edukado 9
Ekonomio 137

Eksiĝoj 1
 Eksteraj rilatoj de UEA 81
 Ekzameno internacia 10, 190
 Eldonaĵoj:
ABZ de amo 190
Alten alten malproksimen 131
Anni kaj Montmartre 113
Antaŭen al la laboro! 11
Books Abroad 57
Budapeŝta informilo 175
Danĝera lingvo, La 186
Dekopo de Afke, La 90
Enciklopedia vortaro E-jida 169
Enkonduko en ĝeneralan biologion 12
Enkonduko en organikan kaj biologian kemion 52
Esperanto en FR Germanio 174
Esperanto en perspektivo 29-32, 193
Esperantonytt 175
Eszperantó magazin 196
Etnografiaj donitaĵoj 132
Foraj steloj, La 53
Fundamentaj konceptoj en kemio 52
Granda galerio Zamenhofa 13
Historio de la kontraŭreĝima Esperanto-movado 131
Homo kaj lia vivo, La 131
Horloĝisto de Djen Bjen Fu, La 118
Hungara vivo 196
Informado kaj dokumentado pri kemio 52
Interesa arkeologio 70
Internaciisto 196
Iracema 170
Kemio de manĝaĵoj 52
Kemio kaj biokemio de karbonhidratoj 52
Kompleta lernolibro de regula Esperanto 53
Kontakto 14, 116
Lingvoj, gentoj kaj lingva politiko 114
Literatura foiro 137
Literatura mondo 77
Malbona lupu 113
Merlo sur menhiro 71
Mia verda brevierio 169
Mia vivo 70
Monda karuselo 168, 196
Monde, Le 65
Ni devas vivi 70
Nuntempa Bulgario 38
Planktono kaj mara produktado 90
Pollando – nombroj kaj faktoj 38
Premiitaj kaj aliaj noveloj 12
Segmentumitaj animalaj grupoj 192
Sennacieca revuo 168
Stranga butikoj, La 113
Systematikken i esperanto 114
Verdkata testamento 113
Verkoj de V. Eroŝenko 131
Wanted a World Language 97
Zamenhof: leteroj 192

Elekto de komitatanoj B 58, 102
 Enciklopedio de Esperanto 133
 Enciklopedioj 57
 Ergoto de Bonaero 96
 Eroŝenko, V. 131
 Esperantologio 137
 Esperanto-politiko 4
 Eŭripido 211
 Eŭropa Ekonomia Komunumo 3, 48
 Fayot, J. 57
 Fervojistoj 17, 106
 Filatelo 137
 Filmo 195
 Financo 16, 21, 22, 43, 105, 184, 185
 Finnlando 37, 56, 76, 117, 161
 Flugkompanioj 17
 Foiroj 77, 137
 Fondaĵo Canuto 2, 105
 Fontes, E. 16
 Forge, J. 169
 Forster, P.G. 57, 65
 Fotografio 46, 151
 Fournier, A. 210
 Fowler, J.G. 100
 Franca lingvo 64, 65, 87
 Francio 36, 76, 96, 106, 117, 136, 174, 196
 Frank, H. 28, 85, 190
 Fuller, D.B. 77
 Gabrielli, L. 70
 Geografio 175
 Germana lingvo 47
 Germanio FR 16, 36, 38, 56, 74, 96, 97, 174
 Gibczyńska, J. 154, 155
 Gjivoje, M. 70, 85
 Golden, B. 70, 118
 Goldoni, C. 154
 Goodheir, A. 71, 211-212
 Govaers, M. 57
 Gregor, D.B. 202
 Greklando 54, 66
 Groeneveld, R.C. 16
 Grum, J. 38
 Ĝenerala voĉdono 139
 Ĝuĝev, S. 166
 Haas, P. 179
 Haazen 86
 Hagler, M. 26
 Hammer, J.K. 188
 Harmon, W. 204
 Harry, R.L. 38
 Haudebine, M. 11, 17, 153
 Haupenthal, R. 123
 Heredia, J.M. 217
 Hernández Llusera, V. 88
 Hill 156
 Hinda Unio 11, 108
 Hispanio 16, 74, 117
 Historio de la Movado 5, 97, 112, 186
 Hodler, H. 21
 Holzhaus, A. 13, 192
 Honoraj membroj 152
 Hungario 28, 48, 196

Hunter, J.N. 26
 Informado 74, 76, 98, 135, 175, 190
 Instituto Hodler 84, 105
 Instruado 28, 48, 106, 118, 125
 Instruistoj 38, 48
 Interlingvistiko 16, 26, 77, 85, 97, 107, 196
 Internacia Jaro de la Virino 81, 121, 147, 148
 Internacia Esperanto-Instituto 101, 108
 Internacia Somera Universitato 89, 151, 185
 Interpretado 116
 Irano 57, 174, 197
 Isaev, M. 107
 Islando 109, 117
 Italio 37, 76, 77, 97, 136, 197
 Itô Saburô 131
 Jakubcová, M. 98
 Jamaga, T. 131
 Japanio 56, 98, 117, 128, 137, 196
 Jasspé, A. 26
 Jordan, D.K. 132
 Jørgensen, A. 81
 Jugoslavio 16, 36, 37, 77, 85, 96, 136
 Junularo: vidu TEJO
 Kalendaro 92
 Kanado 56, 76
 Kärt, B. 168
 Kawamura, S. 52
 Kawasaki, N. 53
 Kervers, H. 100
 Kocaman, H. 179
 Kolker, B. 175
 Kolombio 2, 37, 76, 97, 117, 174
 Komputiloj 28
 Kondor, J. 77
 Konferenco sarlanda 123
 Kongresoj:
 UK 59a, Hamburgo, 1
 UK 60a, Kopenhago 15, 34, 55, 75, 81, 95, 115, 141-160, 196
 UK 61a, Ateno, 68, 172, 195
 UK 62a, Rejkjaviko 84, 109
 IJK 31a, Fredericia 14, 72, 94, 158
 IJK 32a, Tesaloniko, 68
 Kongresoj aliaj:
 Blindula 164
 Fervojista 106
 Infana 164
 Itala 37
 Jugoslavia 37, 98
 Kanada 56
 Pacifika 37
 Portugala 56, 98
 SAT 165
 Konisi, G. 130, 151
 Konkursoj:
 Belartaj 46, 83, 149, 166, 167, 189, 211-213
 "Larius" 137
 "Luigi Minnaja" 46, 218

"Raymond Schwartz" 46, 218
 Varbado 101, 189
 Kooij-Waal, M.A. van der 190
 Koreo 97, 189
 Kotizoj 59, 178
 Kraujins, K. 59
 Kubo 37
 Kurisu, K. 32
 Kursoj 38, 77, 97, 164, 175
 Kuvajto 64
 Lapenna, E. 46, 191, 214
 Lapenna, I. 1, 29, 31, 57, 88, 123
 Laste aperis . . . 13, 33, 53, 71, 91, 114, 170, 193
 Lemme, M. 40
 Lernejoj 57, 98, 106, 125
 Lernolibroj 11, 38, 77, 98, 175
 Leteroj de legantoj 50, 88, 130, 190
 Lewin, R.A. 90
 Libroj 5, 49
 Lingva diskriminacio 47, 65, 187
 Lingva problemo 3, 37, 47, 48, 64, 87, 129
 Lingvistiko 26, 38, 85, 196
 Lingvo-instruado 64, 87
 Lins, U. 5, 13, 29, 31, 70, 131, 186
 Literaturo 26, 30, 76, 201
 Loibel, M. 59
 Loorits, E. 118
 Luksemburgo 198
 Maimon, N.Z. 169
 Makkink, G.F. 12, 37
 Malto 57, 175
 Markarian 175
 Masterman, D. 190
 Matias 38
 Mathis, A-L. 130
 M'Bow, A-M. 122
 McInemy, D.Q. 26
 Medicinistoj 17
 Meksikio 136
 Membro-statistiko 59, 101
 Methling, F. 155
 Migliorini, B. 178
 Milojević, S. 47, 81, 83, 123
 Milton, R.J. 190
 Mimó, L. 53
 Minacataj lingvoj kaj kulturoj 87, 187
 Minani, J. 77
 Minnaja 46, 197, 218
 Minoritatoj 187, 196
 Miyamoto, M. 88, 131, 175
 Moon, B. 157
 Moritz, U-J. 41
 Movado, 1, 4, 22, 30, 32, 127, 143, 146, 161, 163
 Mueller-Sorau, F. 178
 Münnich, A. 28, 85, 130
 Nederlando 37, 38, 171
 Neergaard, P. 89
 Negalha, J. 213
 Neumann, S.K. 112
 Neŭtraleco 1, 142
 Noret, M. 88
 Noriça Jubilea E-Fondaĵo 6

Norvegio 198
 Nowakowski, T. 88
 Novjara mesaĝo 22
 Nov-Zelando 48, 54
 Oficiala informilo 19, 39, 58, 79, 99, 119, 139, 177, 184, 198
 Ornitologio 57
 Osias, S. 4
 Parlamenta agado 6, 97, 106
 Parlamentoj 96
 Pasporta servo de TEJO 74
 Pazigrafioj 133
 Pedagogio 77, 97
 Peevski, V. 197
 Peruo 77
 Pettyn, A. 37
 Pič, K. 206
 Pilger, W. 90, 113, 170, 205
 Politiko 6
 Pollando 8, 54, 57, 76, 118, 194, 196
 Pompilio, G.G. 130
 Pool, J. 31, 62, 77, 107, 114, 181
 Portugalio 56, 171, 194
 Postkongreso 24
 Poŝtmarkkolektado 39
 Prelegoj 37, 77, 86, 118, 175
 Price, K.F. 52
 Pupteatro 56, 97, 154, 191
 Radio 18, 60, 78, 98, 99, 115, 138, 176, 199
 Ragnarsson, B. 46, 70, 109, 149
 Recenzoj (kondiĉoj) 13
 Recenzoj: vidu Eldonaĵoj
 Regiona agado de TEJO 94
 Regiona agado de UEA 108, 127
 Rezolucioj 142, 143, 145, 148
 Rosbach 46
 Rossi, N. 212
 Rotario 137
 Rotkvić 46
 Rumanio 57, 76, 96
 Rusak, H. 169
 Sack, G.Ch. 59
 Sadler 1, 63, 141, 181, 197
 Sakuma, T. 52
 Santos Morales 2
 Sarlando 123
 Sartre, J-P. 118
 SAT 165
 Scharff, E. 100
 Schleicher, Ib 114
 Schubert, K. 158, 159
 Schwartz, R. 46, 113, 218
 Scienco 175
 Sekelj, T. 12
 Semajno de Internacia Amikeco 76
 Setälä, V. 118
 Sielens, H. 40
 Simeonov, S.D. 17
 Singapuro 174
 Sinha, L. 11
 Skaljer-Race, Vesna 216
 Skoltoj 97, 188
 Skotte, J. 77
 Skyberg, A. 178

Smith, R. 167
 Societo Zamenhof 21
 Soveta Unio 37, 48, 76, 98, 107, 168, 174, 197
 Starr, M. 5, 153
 Statuto de UEA 41, 139
 Støp-Bowitz, C. 12, 192
 Sud-Afriko 136
 SUK (Someraj Univ. Kursoj) 192
 Sunardo, E. 137
 Sutton, G.H. 114, 197
 Svedio 77, 117, 175
 Svislando 16, 74, 96, 98, 174
 Sygnarski, M. 153
 Szerdahelyi, I. 28, 38, 85
 Šemer, J. 51
 Šibajama, Z. 40
 Tacumi, J. 137
 Tampey 5
 Tárkony 169
 Teatro 17, 137, 154
 TEJO 36, 54, 74, 94, 116, 157, 159, 171, 194
 Televido 118, 196
 Telling, J. 179
 Terminologio 175
 Testamentoj 5, 185
 Thollet, C. 77
 Thorsen, P. 66
 Tišljär, Z. 85
 Tonkin, H.R. 21, 22, 38, 56, 71, 98, 118, 146, 152, 161
 Tressel, L. 179
 Turismo 9, 38, 118, 194, 196
 Tyblewski, T. 9
 Ubeko, W.Y. 7
 UEA:
 Estraro 1, 22, 43, 83, 141
 Komitato 1, 141
 UN 47, 81
 Unesko 47, 81, 116, 121, 122, 197
 Universala Ekspozicio 119
 Universitatoj 37, 175
 Usono 38, 56, 187
 Velebit, J. 85
 Venture, A. 12, 46, 53
 Veterana Esperantista Klubo 5
 Vink, J.H. 59
 Vjetnamio 128
 Volontula servo 61, 181
 Vortaroj 17, 169
 Vrančić, J. 85
 Wagner, H. 179
 Walraamoen, K. 70
 Waringhien 11, 29, 46, 192, 217
 Wells, J.C. 32
 Wensing, E.L.M. 38
 Wiechowski, M. 213
 Woessink, E.J. 185
 Wood, R.E. 16, 26, 50
 Zacho, K. 25
 Zacho, P. 39
 Zaleski-Zamenhof, L. 83, 152
 Zamenhof, L.L. 11, 192
 Zlatnar, P. 125

REVENIS

KRUKO

KAJ

BANIKO

EL Bervalo

APERIS LA DUA ELDONO de la jam (fi)fama anekdotaro de Louis Beaucaire.

Tiu vigle ilustrita originala ridincitilo kun la subtitolo "Maldecaj anekdotoj por neprudaj legantoj" tiel furoris tra la mondo, ke la unua eldono el 1970 jam post nuraj ses monatoj estis havebla nur prunte aŭ ŝtele.

Sed nun vi povas aĉeti kaj posedi propran ekzempleron. Prezo 16 guldenoj.

SUK-76

atendas vin en la

UNIVERSITATO de ANTVERPENo

Belgio 08.-29.08.1976

BIOLOGIO – MATEMATIKO – SOCIOLOGIO

Informas: Someraj Universitataj Kursoj, Boîte Postale 9, B-4000 Liège 3 (Belgio)

Aperis: **BAKĤANTINOJ** de Eŭripido, £1, eble la plej "moderna" inter klasikaj dramoj. Elgrekigis D-ro Albert Goodheir.

Ankaŭ havebla: **MERLO SUR MENHIRO**, £0,80, originala poemaro de Albert Goodheir. "Mi emfaze rekomendas tiun ĉi poemkolekton" (William Auld en "Brit. Esp." Sept. 1975)

Mendu ĉe: **Eldonejo KARDO**, 16 Woodlands Drive, Coatbridge ML5 1LE, Britio. Prezoj inkluzivas sendokoston.

La lasta manuskripto de d-ro Zamenhof

H.C. ANDERSEN

FABELOJ

(IV-a volumo)

Tradukis d-ro L.L. Zamenhof

*53 originalaj desegnaĵoj de
A. Uniechowski
244 paĝoj*

Prezo: 13 gld. aŭ egalvaloro
plus sendokostoj 10%.

Eldonis: Heroldo de Esperanto
Rue de la Reinette (Pippelingstraat) 13,
boîte 28, B-1000 Bruselo

Mendu ĉe la eldoninto aŭ ĉe UEA



Olimpika donas amikan Greklandon antaŭ la alveno

Flugo kun Olimpika signifas
unuarangan servadon,
la plej modernan ekipaĵon,
bongustegajn manĝojn
kaj la malnovan tradician gastamon.

Ĉion bezonatan, por ke vi sentu vin hejme.
Kaj, kiam vi alvenos en Greklando, permesu, ke ni montru
ĝin al vi, kiel nur ni kapablas tion fari.

Ni helpas al vi elekti vian propran lokon sub la suno,
el inter la 34 lokoj sur la tero kaj insuloj de Greklando,
al kiuj ni flugas.

Venu flugi kun ni kaj ĝui nian Olimpikan gastamon.
Ĉar ni estas la moderna flugkompanio
kun la antikvaj grekaj tradicioj.

flugkompanio
OLYMPIC

La oficiala flugkompanio de la 61a Universala Kongreso

